



4*1993*157

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Kio estas nova kaj interesa en nia vendejo?

Signo:	Titolo:	Prezo Kč
Kz- JG	Kantoj de 1' popolo (kazedo kun slovakaj popolkantoj en Esperanto)	85,--
CD-JG	Kantoj de 1' popolo (CD kun slovakaj popolkantoj en Esperanto)	170,--
C 209	Internacia Seminario pri Komenio (prelegaro de Antaŭkongreso en Prago 1992)	16,--
C 140	I. Lejzerowicz: El la "Verda Biblio"	20,--
Duc	J. Ducrocq: Laŭflue de 1' vivo (kolekto de poemoj eldonita de la aŭtoro kaj akompanata de liaj desegnoj)	10,--
"5"	M. Jókai: La Filoj de 1' Ŝtonkora Homo (en formo de bildrakonto)	10,--
C 207	H. C. Frank: Propedeutická hodnota mezinárodního jazyka (Propedeutika valoro de la Internacia Lingvo)	15,--
C 201	Stomatologia terminaro (Broŝuro + softvaro)	288,--
C 202	Stomatologia elektronika vortaro	144,--
C 203	Hidraŭla termianaro (broŝuro + softvaro)	288,--
C 204	Aplikprogramo Termino 1 + Runtime	165,--
C 205	Demonstra disketo ISO 6937	50,--
C 206	Internaciaj ISO-kodoj, nomoj de landoj k.s.	65,--
C 200	S. Štimec: Vojaĝo al disiĝo	30,--
C 208	Almanako Lorenz 1991	26,--
C 208	Almanako Lorenz 1993	26,--
A 006	Insigno "Mi amas Esperanton" (disko 37 mm kun fermebla plinglo)	17,--

Ankoraŭ eblas aboni "Heroldo de Esperanto" 1993. La komencjarajn numerojn ni liveros de rezervaj ekzempleroj. Abono por 1993 estas 350 Kč.

VIAJN MENDOJN NI ATENDAS KUN PLEZURO JE LA KONATA ADRESO:

ČESKÝ ESPERANTSKÝ SVAZ, EXPEDICE, JILSKÁ 10, 110 00 PRAHA

La politika fera kurteno inter la okcidenta kaj orienta partoj de Eŭropo falis, sed anstataŭ ĝi leviĝis nova obstaklo, la ekonomia muro. Granda diferenco inter la realaj salajroj kaj oficialaj monkurzoj dekobligas por orientanoj la prezojn en la okcidenta Eŭropo, sed aliflanke dekonigas la kostojn por okcidentanoj en la orientaj landoj. Tiu deklivo inspiris la ideon malŝlosi pordojn en la muro per Esperanto. Germanaj kaj ĉeĥaj esperantistoj decidis malfermi la unuan el la pordoj per komuna kongreso proksime ĉe la landlimo, kompreneble sur la malpli kosta ĉeĥa flanko.

Elektita estis la internacie konata banurbo Karlovy Vary (Banejo de Karlo, Karlsbad), nomita laŭ la mezepoka imperiestro Karlo IV (1316-1378), kiu laŭ legendo malkovris la kuraĉajn varmajn akvofontojn dum ĉasado. Edukita en Francio, filo de Johano de Luksemburgio kaj Elizabeta de Bohemio, poste mem bohema kaj germana reĝo kaj romia-germana imperiestro, Karlo IV simbolas la tuteŭropan internaciecon generale, kaj rilatojn inter la germanoj kaj ĉeĥoj speciale, kiel emfazis d-ro Bormann dum la inaŭguraĵparoladoj. Simbola estis ankaŭ la Pentekosta semajnfino (28.-31.5.1993), festo memoriganta ne nur la Dekalagon donacitan de Dio al Moseo, sed ankaŭ mal-supreniron de la Sankta Spirito sur apostolojn kaj ilian kapabligon interkompreniĝi kun ĉiuj popoloj.

Ĉeĥoj kaj germanoj kunvivis dum jarcentoj, tamen ne ĉiam amike; ĝuste en la dudeka jarcento ili batis al la reciproka kunekzistado profundajn vundojn. En la iama aŭstria monarkio la germanlingvanoj, kvankam nur triono de la loĝantaro,

estis reganta popolo, dum la ĉeĥlingvanoj (kvinono de la loĝantaro) minoritato. Dum unu nokto, la 28-an de oktobro 1918, kiam estis proklamita Ĉeĥoslovakio, la situacio en la nova ŝtato inversiĝis. Tri milionoj da ĉeĥoslovakaj germanoj neniam kunpaciĝis kun minoritata rolo, kiun ili sentis maljustaĵo. Dum la faŝisma periodo, flarante sian ŝancon, per provokoj ili havigis al Hitler pretekston okupacii la landon - ĉeĥoj estis elpelataj el siaj hejmoj, mortigataj en koncentrejoj, eĉ en publikaj ekzekutoj, al kiuj germanoj aĉetadis biletojn. Post la milito estis ĉiuj tri milionoj da germanoj forŝovitaj el la lando, senkonsidere, ĉu ili estis faŝistoj aŭ ne, senkulpaĵ kiel kulpaj, la forŝovantoj ofte praktikis kontraŭ forŝovatoj superfluaĵajn kruelaĵojn kaj humiliigojn. Nun la forŝovitoj repostulas sian konfiskitan havaĵon, kiun la ŝtato jam antaŭ preskaŭ kvindek jaroj disvendis al novaj posedantoj. Tiuj kompreneble timas pri sia proprietaĵo kaj ĝenerale regas en Ĉeĥio timo antaŭ la germana ekspansio.

En tiu tikla situacio esperantistoj volas montri, ke la homoj povas pace interkompreniĝi rigardante en la futuron. Ĝuste tial la unua komuna kongreso inter ĉeĥoj kaj germanoj.

La kongresejo trovis sian lokon en la hotelo Thermal, la plej granda kaj moderna el la hoteloj de la urbo. La unuopaj kongresaj ĉambregoj ricevis nomojn laŭ la fondintoj de la ĉeĥa Esperanto-movado komence de la jarcento (Lorenc, Ĉejka, Kamarýt) kaj laŭ la plej majstraj ĉeĥaj E-tradukantoj (Hromada, Lukáš, Pumpr). Riĉaj kongresanoj loĝis rekte en la hotelo, situanta en la urbocentro ĉe rivereto plena de fiŝoj, la

ceteraj trovis sian liton en studenta hejmo post dudekminuta piediro supren. La urbon ĉirkaŭas ringo de montetoj, sur kies deklivoj dum jarcentoj kreskis domoj. Bedaŭrinde restis nur malmulte da tempo por trarigardi la pitoreskan urbeton kaj por gustumi ĝiajn dekdu kuracajn fontojn - sole la dektria estis aĉetebla en la hotela koktelejo (Becher-likvoro).

La vendredan interkonan programon spicis la folkloro ensemblo Dyleň per kantoj kaj dancoj, kies melodiojn ankaŭ multaj germanoj konis kiel siajn - plia pruvo pri centjaraj interrilitoj de ambaŭ popoloj. Kelakjn kantojn Dyleň kantis en Esperanto.

La sabatan inaŭguron, komunan por ambaŭ asocioj, malfermis reprezentanto de la urbo per la saluto de la ĉefurbestrino, kaj tuj sekvis la alparoloj de ambaŭ asociaj prezidantoj, Ing. Dr. Petro Chrde (ĈEA) kaj Dr. Wolfgang Schwanzer (GEA). La reprezentanto de UEA, Dr. Ulrich Lins, emfazis la gravecon de la nova ideo iniciati la kunlaboron inter okcidentaj kaj orientaj E-asocioj, kaj vicprezidanto de la Akademio, Dr. Bormann, priskribis la jam menciitajn rilatojn de ambaŭ nacioj ekde Karlo IV. La antaŭtagmezan programon fermis per oper-arioj de Dvořák, Wagner kaj aliaj majstroj la fama ĉeĥa baritonulo-esperantisto Miroslav Smyčka akompanata de Jan Zimmel. Solene estis proklamitaj novaj honoraj membroj de ĈEA: **Lada Bala, Dr. Rudolf Horský, Jan Janda kaj Ing. Karel Janouš.**

Posttagameze la tri apudaj ĉambroj Hromada, Lukáš kaj Pumpr ekzumis de paroladoj kaj diskutoj de fakaj kunsidoj pri interlingvistiko, medicino, tekniko, esperantaj kolektado, instruado, KELI kaj pri ĝemeliĝo kun Zairio. Mi partoprenis

unue kunsidon de interlingvistoj kaj poste en la sama ĉambro de teknikistoj. Dr. Detlev Blanke klarigis sintenon de lingvistoj al la ideo de internacia lingvo kaj eblojn konvinki ilin aŭ almenaŭ veki ilian intereson. Pri la temo disvolviĝis vigla diskuto, en kiu estis konstatite, ke lingvistoj kiel cetere plejparto de fakuloj malfidas al amatoroj, kvankam statistikoj montras, ke multajn gravajn malkovrojn kaj inventojn de la homaro faris amatoroj aŭ fakuloj el alia fako.

La teknikistoj per voĉdonado konfirmis la provizoran estraron de la nuntempa sciencoteknika sekcio de ĈEA (Pospíšil, Krob, Malovec) kaj ekdiskutis pri komputilaj programoj plej taŭgaj por prilabori terminarojn en Esperanto.

La sabata vespero estis kronita per teatraĵo verkita de la ĉeĥa ŝtata prezidento Václav Havel "Aŭdienco", tradukita de Josef Vondroušek kaj prezentita de la germana grupo "Kia Koincido". La prezentado ricevis specialan permeson de la prezidento. La komedio priskribas la tempon, kiam la dramverkisto Václav Havel pro politikaj motivoj devis labori en bierfarejo kaj estis alvokita al "aŭdienco" ĉe malklera kaj ebria bierfaristo, kiu post longaj ĉirkaŭparoloj fine elbalbutas peton, ke la sinjoro verkisto mem skribu pri si denuncajn raportojn por la sekreta ŝtata polico, ĉar labierfaristo jam skribis ĉion, kion li sciis, kaj nun li nekapablas elpensi novan raporton. Du apokrifojn de Karel Čapek, tradukitajn ankaŭ de s-ro Josef Vondroušek, Marta kaj Goneril, prezentis fama Praga aktorino-esperantistino Eva Seemannová kaj la paŭzojn plenigis per arioj MiroslavSmyčka akompanata de Jan Zimmel. La vespero finiĝis perdancamuzo.

Dimanĉe post ekumena diservo ambaŭ asocioj traktis aparte. En la salono Kamarýt la germanoj parolis Esperante, dume la ĉeĥoj en la salono Lorenc ofte krokodilis, eĉ montris al si la dentojn. La traktado pri la nova statuto forrabis preskaŭ la tutan tempon senfrukte, kaj por elektado de nova estraro restis sole duonhoro. La estraro nur ŝanĝis la nomon (Komitato anstataŭ Konsilio) kaj inĝenieron Dvořák anstataŭigis magistrino Vlasta Janáková. La ceteraj estraranoj estis reelektitaj, ing. Vlastimil Kočvara fariĝis prezidanto de ĈEA. D-ro ing. Petro Chrdle estas nun vicprezidanto.

Mi bedaŭrinde devis pro mia profesia devo posttagmeze forveturi kaj tial mi ne vidis la vesperan programon kun du "magiistoj" nek ekskursojn tra la urbo kaj tra la ĉirkaŭa regiono. Dum la kongreso funkciis ankaŭ libroservo, kvankam ne kun tre granda elekto-eblo.

La kongreso pruvis utilecon de komunaj dunaciaj aranĝoj, paroligante en Esperanto ankaŭ tiujn, kiuj antaŭe timis aŭ pigris elbalbuti almenaŭ unu frazon, kaj konkurigante ambaŭ asociojn, kiuj klopodis prepari pli bonan kaj pli riĉan programon ol ĉe ununaciaj okazigaĵoj. La kongresa temo: "Esperanto - ŝlosilo al la najbaroj en Eŭropo" plenumiĝis, unu plua pordo estis malfermita.

KELKAJ POSTNOTOJ
AL NIA KONGRESO

Ing. Vlastimil Kočvara,
prezidanto de ĈEA

Per la komuna kongreso en Karlovy Vary naskiĝis en nia asocia historio nova fenomeno. Unuan fojon nia nacia kongreso vere internaciigis, ja preskaŭ duono de la ĉeestantoj estis alilandanoj, kiuj mem havis

enkadre de la komuna sian naci-an kongreson. Organizita tian kongreson estis por ni novaĵo - ne tiel por germanoj, kiuj jam kelkfoje dulande kongresis: Tuj ĉe la komenco de preparlaboroj montriĝis, ke oni ne tre facile povas akordigi komunan programon, ĉar ambaŭ organizantoj - do Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Germana Esperanto-Asocio - havas proprajn kutimojn kaj proprajn imagojn pri kongresaj tagoj. Ni jam el niaj pasintaj kongresoj sciis, ke ĉeĥoj estas iom babilemaj kaj tial ni bezonas pli da tempo por diskuti niajn asociajn problemojn ol germanoj, tio cetere konfirmiĝis dum la traktado pri la nova asocia statuto. Pro tio la tritaga kongresa programo naskiĝadis nur malrapide kaj malfacile kaj la fina kompilaĵo estis certa kompromiso, kiu konvenis al ambaŭ asocioj. La apartigitaj memstaraj kunvenoj estis limigitaj je minimumo - nur je laborkunsidoj dum la dimanĉa antaŭtagmezo. Ĉiuj aliaj kongresprogramoj estis komunaj kaj interesaj por ĉiuj partoprenantoj.

La laborkunsido de nia asocio havis - se oni ne kalkulas diskuton kaj malfermon - fakte nur tri ĉefpunktojn: la financan raporton, akcepton de la nova statuto kaj la elektojn (la agadraporto estis jam parto de la inaŭguro). Sed la difinita antaŭtagmeza tempo apenaŭ sufiĉis por ĝisfunde pritrakti menciitajn punktojn, kaj oni estis perdantaj la tempon ofte kun problemoj marĝenaj aŭ nematuraj. Ekzemple al diskuto pri la nova statuto estis la membraro instigita pere de Starto preskaŭ unu jaron antaŭ la kongreso, pri ĝi oni parolis en la konferenco en Pardubice-Ribitví - tamen proponoj kaj instigoj al al konkerna komisiito ne venis. Des pli da proponoj kaj ideoj aperis dum la laborkunsi-

do, kio sekve formanĝis tro da tempo. Grandan atenton vekis la de ni uzata balotsistemo, nome, ke la balotrajton havas nur delegitoj de la kluboj kaj sekcioj, da kiuj estis en la salono ĉirkaŭ kvindeko, dum la kunvenon ĉeestis triobla nombro da partoprenantoj sen balotrajto. Pri tio ekestis longa diversopinia argumentado, kiu ne venis al la fina rezulto, sed la komitato estis taskita solvi tiun ĉi problemon helpe de referendumo inter la membraro. Se la instigo estus veninta jam antaŭ la kongreso, estus verŝajne tiu ĉi demando jam solvita.

Relative glate fluis la elektoj. Sed la nove elektita Komitato ne estis surprizo, ĉar ĝi konsistas el la samaj membroj, kiel la antaŭa Konsilio krom unu nova komitatanino. Elektitojn tio probable ĝojigis, ĉar tiu fakto dokumentas, ke ili laboris kontentige en la pasinta funkci-periodo kaj ili havas fidon de la membraro. Sed tio alportas ioman danĝeron de stereotipa laboro kaj manko de novaj ideoj. Pli bone estus plinombra ŝanĝo en la asocia gvidorgano, sed mi komprenas, ke tiu ĉi intenco estas nur malfacile plenumbla, ĉar la elektokomisiono, kiun mi povis dum ĝia funkciado observi, havis nur limigitajn eblecojn starigi vastan kandidatoliston pro neintereso kandidatiĝi flanke de la membraro. Mi povas nur danki al la komisiono kaj ĝia estro s-ano Jiří Pištora, ke tamen ili sian malfacilan taskon sukcese plenumis.

La legantojn, kiuj en Karlovy Vary ne estis, eble surprizas, ke la laborkunsido de ĈEA ne akceptis finan deklaron aŭ proklamon. Tio ja ne estas manko de nia kongreso, sed en situacio, kiam la asocio baraktas sur rando de financa abismo ĉiaj proklamoj perdas sencon. La komitatanoj nur devontigis

sin trovi vojon por plua daŭra ekzisto kaj agadpovo de la asocio. Kaj teni tiun ĉi staton de ne profitdona kaj relative malmultnombra organizaĵo en tempo, kiam la plej grava kondiĉo de sukcesa laboro estas sufiĉo de monrimedoj, postulas de ĉiu funkciulo - aparte en la gvidorganoj - maksimuman sinoferecon kaj konvinkigon pri nobla celo de nia movado kaj laboro. Kaj tiuj ne mankas al niaj komitatoj.

V. Kočvara

Sekretariino de la ŝtatprezidento sendis al nia asocia prezidanto jenan leteron:

Estimata sinjoro Kočvara,
en la nomo de sinjoro prezidento mi kore dankas vin por la informoj pri la traktado kaj rezultoj de via unua komuna kongreso de ĉeĥaj kaj germanaj esperantistoj, kiu okazis fine de majo ĉijare en Karlovy Vary, kaj ankaŭ por la almetitaj materialoj.

Sinjoron prezidenton tre ĝojigis la informo pri la sukcesa prezentado de lia dramo Aŭdienco en Esperanta traduko. Mi certigas vin, ke li sincere ĝojis pro ĝi.

Samtempe kun vi informis sinjoron prezidenton la tradukinto de la dramo sinjoro Josef Vondroušek pri realigo de la prezentado kaj pri la favora reago de la ĉeestantaj spektantoj. Lianome mi dankas vin por la preparo de la scenigo kaj al sinjoro Vondroušek mi sendas dankon en speciala letero.

Mi dankas vin ankaŭ por la letero de 18.5. Ĉijare, je kiu ni - pro granda kvanto da laboro - ne sukcesis ĝustatempe reagi. Vian afablan inviton sinjoro prezidento ne povis akcepti, ĉar - kiel vi certe legis en gazetaro - li estis malsana.

Permesu al mi, ke mi salutu vin mianome kaj ankaŭ nome de

sinjoro prezidento kaj deziru al vi multajn sukcesojn en via agado de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sed ankaŭ multe da plezuro kaj kontento en la persona vivo. Kore salutas

Anna Freimanová sekretariino de la ŝtatprezidento

SEA kongresis

Ĉar Slovakia Esperanto-Asocio havas la saman funkcion-periodon kiel nia asocio, ĝi okazigis du semajnojn post la nia sian 12-an kongreson, ĉifojne en Bratislava. En la tagoj 11.-13.6.1993 kunvenis proksimume 90 ĉeestintoj, inter tiuj ankaŭ deko da personoj el Ĉeĥa Respubliko. La kongresanaron alparolis krom de ĈEA oficialaj reprezentantoj de HEA, PEA kaj la Rumania movado, krome ĉeestis individuoj el Germanio kaj Bharato. La agadoporton por la lasta trijara periodo prezentis la ĝistiama prezidento de Sea inĝ. Milan Zvara. Gravan parton de sia raporto li dediĉis al la Esperanto-Centro en Poprad, kiu fariĝis grava internacia renkontejo kaj li informis pri plej gravaj efektivigitaj eventoj en ĝi. Simile kiel en nia lando ankaŭ en Slovakio malkreskis la membraro de la asocio je 2400 personoj, sed aktuale la membrotitizon pagis apenaŭ 500 el ili. Parolinte pri skribaj kursoj ili konstatis, ke nuntempe la enspezoj el ili subiras la anoncokampanjon - sekve do oni ne povas uzi vastan reklamadon. Tial la nombro de studentoj en tiuj kursoj estas preskaŭ neglektebla. Grava problemo fariĝis la asocia organo Esperantisto Slovaka, kiun abonas nun nur 350 abonantoj (la abono ne estas enkalkulita en la asocia membrotitizo); ĝi estas enviinde belspekta, enhave interesa kaj aperas tute regule - sed la eldonspezoj estas altegaj. Dife-

rence disde nia asocio en SEA bone funkcias la regionaj komitatoj (ĉe ni iam funkciis nur la nordmoravia) kaj la membronombro en ĉiuj tri landaj regionoj estas preskaŭ proporcia. Plue la prezidento skizis la atendatan evoluon de la asocio, ĉefe ĝiajn ekonomiajn kondiĉojn kaj financon staton. Oni preparas specialan komercan kompanion, kiu subtenus agadon de la asocio. Estas ankaŭ celo ekfunkciigi novan asocian kancelarion en Bratislava, kiu transprenos prizorgon pri la membraro, gazeto kaj eldonagado.

La raporton de inĝ. Zvara kompletigis pluaj parolintoj, nome A.Zachariáš pri lingva instruado, L.Fedorová pri junularo kaj dr. M.Šaturová pri aktiveco de katolikoj. Min persone surprizis, ke oni tute ne parolis pri mastromado kaj pri konkretaj financaj rezultoj, simile mankis la revizora raporto.

La sabata posttagmeza programo estis dediĉita al kelkaj sekcioj (la raportanto ĉeestis traktadojn pri monda teismo) kaj fine okazis balotoj, kies rezultojn oni anoncis antaŭvespere. La kongresanoj elektis kiel prezidenton de SEA samideanon Augustin Čambál el Trnava, la vicprezidentoj estas inĝ. M.Zvara kaj dr. St.Košecký. Elektiĝis ankaŭ nova 15-membra Konsilantaro. Provizore ne solviĝis funkcio de sekretario, kiun oni plu serĉas.

La dimanĉa antaŭtagmezo estis plene dediĉita al la plua agado de la asocio. La novelektita prezidento skizis ĉefajn taskojn de SEA kaj siajn ideojn pri ilia plenumo. Post diskuto la kongreso akceptis du gravajn dokumentojn: la strategian planon de Sea por la laborperiodo 1993-1996 kaj decidojn de la 12-a kongreso: La akceptitaj dokumentoj konkretigas laborojn

en diversaj movadaj agadsferoj de SEA. Kiel en pasinteco, ankaŭ por plua tempo oni akcentis necesan kunlaboron kun aliaj eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj, inter tiuj unuavice kun la nia.

La 12-a kongreso de SEA havis tre laborigan karakteron kaj hejmeĉan etoson, kio cetere kongruas kun la nombro de partoprenintoj. Al tiuj ĉi impresoj kontribuis ankaŭ modestaj akompanaj aranĝaĵoj.

- kov -

ESPERANTO EN RADIO KAJ GAZETOJ

En la revuo **EKONOM** (29, 1993) Jiří Patera (EK Praha) informas pri la kongreso ĈEA-GEA en K. Vary kaj mencias la venontjaran kongreson de laboristaj esperantistoj (SAT) en Strážnice.

La gazeto **Naše rodina** (28, 1993) mencias eventualan rolon de Esperanto en artikolo "Estonteco de eŭropa monbileto". - Ni aldomu: ĝis la unua mondmilito ekzistis internacia esperantista monsisistemo (speso) kun sia ĉekbanko en Londono. Gian utilon emfazis Winston Churchill ("Ni enkonduku specon de la esperantista monsisistemo".)

Radio Vltava (23.07.1993): lego el la romano Muž s britvou de Jaroslav Putik, ankaŭ pri Esperanto, kaj frazoj en ĝi. (laŭ S. Zedníková).

Mirinde perfektan kaj fluan Esperanton ni povis aŭdi el la buŝo de 12-jara moskvano, en la Infana Kongreseto en Valencia, pere de **Pola radio**.

J.M.

ANONCO:

Ĉu iu el samideanoj povus vendi al mi "Slovník synonym a frazeologismů?" Eva Techníková, Vítězná 571, 468 41 Tanvald-Šumburk.

ICEM - RENKONTO EN PARDUBICE

La ĉi-jara ICEM-Esperanto-Renkonto okazis de la 14a ĝis la 23a de julio 1993 en la Konstrua Lerninstituto de Rybitví apud Pardubice. Partoprenis entute 52 Freinet-instruistoj kaj interesuloj.

Matene la programo estis dediĉita al diversnivelaĵoj kursoj pri Esperanto, prelegoj kaj fakaj kunvenoj. La unua posttagmezo antaŭvidis solenan akcepton de la urbestro de Pardubice, viziton de la urba biblioteko kaj promenon tra la malnova urbokvartalo. Sekvis ekskursoj al antaŭlerneja edukkejo, la burgo Kunětická, muzeo de marionetoj en Chrudim, hipologia muzeo en Slatiňany, skanzeno Gaja Monteto, valbaraĵo Seč, ĉevalvetkurada stadiono, lernejo por handikapitaj infanoj, baza lernejo, kastelo Hrádek ĉe Nechanice, Betlehemo, Litomyšl kaj Česká Třebová. Aparte menciinda estas la solena posttagmezo en la Kultura Domo Dubina. Prezentadis gekantistoj, franca infanĥoro, magiisto, la sktorino s-ino Seemanová kaj la folklorgrupo Karmazin. Ankaŭ la vesperoj estis ĝindegaj pro prezentado de diapozitivoj pri Ĉeĥoslovakio, prezentado de la propra patrujo pere de kantoj kaj aliaj interesejoj, konkursaj ludoj, danco k.a.

Laŭdire la organizantoj antaŭpreparis la renkonton dum du jaroj. Tio estis bone perceptebla. Do multan laŭdon al Jarmila Rýznarová kaj ŝia skipo, kiu tiom bone organizis la renkonton. Ĉio estis ege kontentiga: la perfekta ĉiĉeronado en muzeoj kaj kasteloj, la manĝoj en la lerneja restoracio kaj la gaja etoso. Nia vizito al la Ĉeĥa Respubliko restas neforgesebla!

Franklano de Zusto
Nederlando

1989 - Ĉu horo nul de la Ĉeĥa-Germana kunlaboro?

La kongresoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Germana Esperanto-Asocio okazis samtempe kaj samloke kiel 1-a komuna kongreso, ĉijare en Karlovy Vary.

La ĉefa ideo, kiun esprimas la kadra temo "Esperanto - ŝlosilo al najbaroj en Eŭropo", estas forte aprobinda. Ĝi validas por la ĉeĥaj-germanaj rilatoj samkiel por la rilatoj kun aliaj najbaroj.

Ĉu la peresperantaj ĉeĥaj-germanaj rilatoj postmilitaj iniciatiĝis en 1989? Ĉu tiu jaro estis la "horo nul"?

Aŭskultinte dum la kongreso la germanflankajn alparolojn kaj la (ĉeĥlingve parolitan) reprezentanton de Karlovy Vary, oni povis ekhavi tiun impreson pri la horo nul. Ĉu GEA ne povintus iom informi ĉe siaj orientaj membroj pri eventualaj spertoj el la tempo de GDREA?

La ĉeĥoj almenaŭ menciis kelkajn faktojn pri la kunlaboro el tiu periodo en la kongreslibro. Tamen, mirigas la aserto de la ĉefurbestrino de Karlovy Vary, ke "spontanaj neoficialaj amikaj renkontiĝoj kreskis en daŭraj kontaktoj precipe kun esperantistoj en la regiono Schwarzenberg" (p.3).

Nu, tiuj kontaktoj ne restis nur spontanaj kaj neoficialaj, sed fariĝis regulaj kaj laŭplanaj (kiel oni prave montras aliloke en la kongreslibro). Kaj ĉu tio estis ĉio? Ĉu nenio pli menciinda en la ĵus pasinta historia periodo? Ĉu hodiaŭ oni devas honti pri tiuj rilatoj? Eble ĝenerale pri multo, jes. Sed ne pri la esperantista agado. Feliĉe la prikongrestema forumo kadre de la kongreso ne konfirmis tiun supozon, ĉar tie, aparte de ĉeĥa flanko, estis menciitaj multaj ekzemploj de ĉeĥa-germana kunlaboro, aparte el la tempo antaŭ 1989.

Ja la horo nul ne estis en 1989! Jam antaŭe estis abundaj kaj interesaj kontaktoj. GDREA kaj ĈEA multon faris por oficialigi kaj pliprofundigi tiujn kontaktojn kaj fari el ili utilan kunlaboron. La amikeckontrakto inter ĈEA kaj GDREA (siatempe kiel "Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR", kio fakte estis asocio kaj en 1981 ankaŭ tiel transnomiĝis), subskribita en la jaro 1978, plioficialigis kaj pluimpulsis tiun kunlaboron.

Ĉar mi kunrespondecis pri tiu interamikiga agado, estu al mi permesate, resumi kelkajn rezultojn:

1. Abundis korespondaj ligoj, kiuj estis konscie subtenataj per anoncoj en "Starto" kaj "der esperantist".
2. Oftis reciprokaj vizitoj. Laŭ anonima enketo ĉiu tria membro de GDREA almenaŭ unufoje jare vizitis ĉeĥan esperantist(in)on aŭ arangan.
3. Evoluadis konkretaj ĉemelurbaj rilatoj, kiuj ne estis "spontanaj" aŭ "neoficialaj" sed apartenis al la laŭplanaj laborprogramoj de lokaj grupoj, subdistriktaĵ kaj distriktaĵ estraroj de GDREA kaj supozeble al la kompareblaj asociaj unuoj de ĈEA. Tiaj relative stabilaj rilatoj ekzistis i.a. inter pardubice kaj Berlin-Lichtenberg, Plzeň kaj Karl-Max-Stadt, Ostrava kaj Dresden, Česká Třebová kaj Schwerin, České Budějovice kaj Suhl, Boží Dar kaj Schwarzenberg k.a.
4. La estraroj de ĈEA kaj de GDREA ofte havis kontaktojn por pridiskuti kaj stimuli la kunlaboron. La naciajn kongresojn (ĉe GDREA: "Centraj Konferencoj", "Centraj Renkontiĝoj") kutime partoprenis delegacioj de la kontraktintaj partneroj.
5. La fakaj komisionoj/sekcioj bone kunlaboris, ne nur fake

sed ankaŭ terminologie. Tio aparte validas por la scienc-teknikaj sekcioj, por la medicinistoj kaj fervojistoj. Menciindas la bonega serio de aranĝoj (S)AEST (Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), grandparte organizita de ĈEA kaj aktive (ankaŭ prelege) partoprenita de fakuloj de GDREA (okcidente, cetere, evidente nekonata).

6. Multaj esperantistoj de GDR partoprenis ĉeĥajn Esperanto-aranĝojn, kaj inverse. Aparte ŝatata flanke de GDREA-anoj estis la tradicia forĝejo de bonaj parolantoj, la fama Somera Esperantista Tendaro (SET) ĉe Lančov. Bonan reputacion ĝuis i.a. ankaŭ la pacrenkontiĝoj de Pardubice kaj la kulturaj festivaloj en Opava. Sed ankaŭ ĉeĥaj esperantistoj evidente ŝatis la (ne tiom multajn) orientgermanajn aranĝojn, aparte IFER eN Leipzig (Internacia Foiras Esperanto-Renkontiĝo), kiu havis altan enhavan nivelon kaj vere internacian etoson.

7. Ankaŭ la kulturalan interŝanĝon ni ne forgesu. La artistoj Miroslav Smyčka kaj Eva Seemanová estis konataj en rondoj de GDREA. Tio same validas por la verkisto Jiří Karen. Ĉeĥaj libroj (tradukitaj i.a. de la daŭre produktiva Josef Vondroušek) estis en la libroservo de GDREA.

8. Aparte menciindas la komuna "nasko" de libro. Temas pri "Immer alt und immer neu. Prager Impressionen" de Gertrud Bradatsch (aperinta en kelkaj eldonoj en Hinstorff-eldonejo Rostock). Tiun originalecan netradician libron pri Prago esperantigis Monika Ludewig el Berlin. Ĝin lingve reviziis i.a. la nuna prezidanto de ĈEA, ing. Vlastimil Kočvara, kiu ĉiam tre subtenis la kunlaboron diversflanke. Sub la titolo "Ĉiam malnova kaj ĉiam nova.

Impresoj pri Prago" la 134-paĝan libron eldonis ĈEA en la jaro 1985 en 5000 ekzempleroj. La licencproblemojn solvis kaj la honorariojn pagis GDREA.

9. Aparte fruktodona estis la serio de "Internaciaj Turismaj Renkontiĝoj de Esperantistoj en Ercmontaro" (ITREE). De 1979 - 1990 entute okazis 13 de tiuj 5-tagaĵoj. Ekde 1981 ili okazis alterne en la GDR-a parto respektive en la ĉeĥa parto de Ercmontaro. Grandan parton de ili motoris la bedaŭrinde jam forpasintaj Jaroslav Klement (Karlovy Vary) kaj Rudolf Eichler (Schwanzenberg).

10. Se oni trafoliumos la malnovajn jarkolektojn de "Starto" kaj "der esperantist", oni trovos multajn pruvojn pri la ĉeĥa-germana kunlaboro poresperanta antaŭ 1989, inter ili recenzojn pri ĉeĥaj (resp. malpli multaj GDR-aj) verkoj, primovadajn kaj prilingvajn artikolojn kaj aliajn materialojn.

Nu jes. Eble ne ĉio estis perfekta. Eble ne ĉio farebla estis farita. Kaj multaj bonaj planoj restis surpaperaj. Tamen, estis sincera reciproka volo por kunagadi. Nemalmulto ja estis farita, eble fundamento, sur kiu oni povas plukonstrui (se la cirkonstancoj permesos ...)

Estas afero de honesteco rilate al tiuj homoj, kiuj realigis la agadon, aparte al la jam forpasintaj, ne forgesi kaj ne ignori la faktojn.

Detlev Blanke

Donacoj por la eldona fondaĵo de Anna Milatová

Stebel Pavel	50,-	KĈ
Rusnek Josef	20,-	KĈ
Kubiczek Karel	50,-	KĈ
Sniegová Anna	50,-	KĈ
Morcinková Hilda...	50,-	KĈ
Milatová Anna	100,-	KĈ

Esperanto-Kongreso en Karlovy Vary per germanaj okuloj

Du landaj asocioj kongresis kune dum la lastaj kvar tagoj de majo 1993 en la limproksima ĉeĥa banloko. La ĉefurbestro Ing. Štorkánová bonvenigis tiun "kontribuon al interkompreniĝo kaj amikeco inter nacioj" en siaj salutvortoj. 354 kongresanoj (156 el Germanio, 198 en Ĉeĥio) aŭdis dum la inaŭguro raportojn pri la okazintaj laboroj de GEA kaj ĈEA kaj tiel oni reciproke informiĝis, kion oni faras enlande.

En sia festprelego d-ro Werner Bormann omaĝis al la kongresurbo priskribante ĝian fondinton Karlo la Kvara. Filo de luksemburgano kaj de ĉeĥino, li kleriĝis en la franca Parizo kaj poste estis en la jaro 1348 la establo de univesitato en Prago, latinlingva edukejo. La latina perdis sian funkcion de internacia lingvo, la germane same. Cent jarojn poste la germana imperiestro Karlo la Kvina korespondis kun siaj germanaj nobeloj france; ankaŭ de tiu lingvo la internacieco fariĝis jam malforta. Do ŝaje neŝanceleblaj pozicioj de lingvoj tamen ne signifas eternan regadon.

Retrovante al Eŭropa unueco kiel en la epoko de Karlo la Kvara la Eŭropaj popoloj ĝuste nuntempe klopodas pri Eŭropa Unio konstruita sur la kunlaboro en la Eŭropaj Komunumoj per la Traktato de Maastricht. Tiel Eŭropo povos gajni pozicion por kunformi la aferojn de la mondo apud Usono, nun monopolista mondreganto. Estus strange, se tiu Eŭropo, strebanta al sia propra rolo en la mondo, subigu ĝuste al la lingvo de Usono kiel sia interkomprenilo. Tial la pledado por Esperanto estas des pli sencohava.

Okazis fakkunsidoj de interlingvistoj, kolektantoj de esperantaĵoj, medicinistoj, ter-

minologoj, instruistoj, kristanoj, la instituto kaj pri Afriko (Zairio). Ekumena Diservo estis celebrita. La urbon tramigris promenantoj, kaj ekskursoj kondukis al najbaraj banlokoj; kompreneble la ekskursantoj vizitis la Zamenhof-monumenton en Františkovy Lázně. Ĉiuj admiris la belecon de Karlovy Vary, la pejzaĝon kaj konstruaĵojn. Ĉar multaj hoteloj kaj restoracioj jam estas privatigitaj, la kontento estis ĝenerala kaj granda.

Admirinda estis ankaŭ la laboremo de la esperantistogiĉetuloj. Du germanaj gesamideanoj laboris tie dum 20 horoj kaj eĉ pli da ĉeĥoj kaj pli longe ĉe sia giĉeto. Jam antaŭe sufiĉe da funkciuloj devis prepari la kongreson, ĉi-foje iom pli temporabe pro du partoprenantaj landaj asocioj kaj pro la vere komplika hotelmendado. Elstara estis la sindediĉo de la LKK-prezidanto Miloš Bloudek el Karlovy Vary, kiu meritas apartan laŭdon.

Ambaŭ partoprenantaj landaj asocioj aranĝis siajn jarĉefkunvenojn. Ĉe la germanoj d-ro Schwanzer estis reelektita kiel prezidanto, ĉe la ĉeĥoj d-ro Chrdle plenuminta sian mandatperiodon pludonis la prezidantecon al s-ro Vlastimil Kočvara. GEA, kiu kongresas ĉiujare, akceptis kiel kongreslokon por 1994 la nordgermanan urbon Kiel, kien certe venos ankaŭ multaj danoj, tiel ke denove estos komuna kongreso kun esperantistoj el najbara lando. Pri tiuj jarĉefkunvenoj la kongresanoj estis detale informitaj.

Sekvante la alvokoj de UEA al ĝiaj landaj asocioj malgravigi per kunlaboro la eksan dividlinion inter la okcidento kaj la orienta bloko (sed Ĉeĥio geografie estas mezeŭropa lando) okazis Forumo sub gvido de

s-ro Vlastimil Kočvara kaj d-ro Werner Bormann, kiun ĉeestis kaj al kiu kontribuis la vic-prezidanto de UEA d-ro Ulrich Lins. En la diskuto kaj la serĉado de ebloj de kunlaboro partoprenis 23 vortanoncintoj. Rezulto estis pli granda klarvido pri la problemoj kaj el tio kelkaj konkretaj paŝoj ĉefe pri interurba kunlaboro, la aranĝado de regionaj renkontiĝoj, ebloj de libroeldonado, fakasociaj komunaj kaj tiaj seminarioj, translimaj koncertoj kaj artaj prezentaĵoj, eventuale denove komuna kongreso.

Dum la interkona vespero kantis kaj dancis foklora ĉeĥa grupo. La amuzan vesperon pleniĝis du magiistoj, kvazaŭ simbolo por la kongreso: unu germana kaj unu ĉeĥa. La arta programo konsistis el kantoj en klasika muziko de s-ro Miroslav Smyčka kaj el la teatra vespero. La ĉeĥino Eva Seemannov prezentis el la apokrifoj de Karel Čapek, kaj la germana ensemble "Kia Koincido" ludis la verkon de Václav Havel (fama aŭtoro kaj ŝtatprezidento de Ĉeĥio) "Aŭdienco", en kiu li priskribas la malagrablan situacion de intelektulo devigata de la komunismaj instancoj labori kiel ŝovanto de bierbareloj sur la korto kaj kiu tamen ne klinas sin sub la cirkonstancojn perfidante siajn principojn. La aktoroj d-ro Martin Haasse kaj Thomas Bormann kaj la reĝisorino Judith Jackson ricevis multan aplaŭdon, same kiel la ĉeĥaj ĵurnalistoj en la bone vizitata gazetara konferenco vidis en ĝuste tiu ĉi teatraĵo elstarajon de la komuna kongreso.

El ĉiuj vidpunktoj la dulanĉa aranĝaĵo estis sukceso. La partoprenantoj interkonatiĝis, la gvidantoj nun konas sin pli bone kaj povas pli efike kunlabori estonte, ĉiuj ekhavis kom-

prenon pri la situacioj en la du landoj, kaj estiĝis amikeca etoso. Tiu ĉi kongreso en Karlovy Vary estas nun agrabla memoraĵo por siaj partoprenintoj.

(Bo)

NOVAJ LABORHORJOJ DE LA ASOCIA VENDEJO

La sekretarioj anoncas novajn laborhorojn de la librovendejo de ĈEA. De **lundo ĝis vendredo** funkcias la vendejo antaŭtagmeze de **la 10:30 ĝis la 12:00** kaj posttagmeze de **la 12:30 ĝis la 16:30 h.** La kialo de ĉi tiu limigo de la laborhoroj estas la fakto, ke la sekretario estas jam unu sola konstanta laboristo de la oficejo.

Estas rekomendinde por tiuj, kiuj vojaĝos Praagon speciale por viziti la vendejon, resp. sekretariojn, **antaŭe interkonsentiĝi** kun la sekretario **pri la vizito** (dato kaj horo).

Dankon pro la kompreno!

JOSEF CHVOSTA 70-JARA

La 25-an de septembro 1923 naskiĝis en Korotice apud Kutná Hora konata esperantisto, nun vivanta en Poděbrady, Josef Chvosta, iama redaktoro de la gazeto Mondano, tradukanto el la ĉeĥa literaturo (liaj tradukoj aperadis ekz. en Nica Revuo).



Asimilado de propraj nomoj - natura proceso en Esperanto

Josef Kavka

Bonvolu pardoni jenan revenon al la demando, kiu fariĝis jam teda: Ĉu esperantigi proprajn nomojn?

Legante, ĉu beletran, ĉu fakan verkon, ĉu reeĥon en gazeto, oni povas konstati, ke aŭtoroj alpaŝas la problemon plej ofte el vidpunkto subjektiva, kelkfoje eĉ emocia, aliffoje hezita aŭ malfida. La diversaj starpunktoj estas malsame motivataj; oni klopodu ilin kompreni kaj toleri.

Tamen utilas, ke estu rekon-siderata kelko da faktoj:

1. **Asimilado** kun ĉiuj atributoj de fleksio (finaĵoj substantivaj, adjektivaj, verbaj, afiksoj, kunmetaĵoj) fariĝas neevitebla en terminoj de onomastika origino, kiel mi provis demonstri en 1981 per elkzemploj el ĥemio, geografio, geologio, petrologio, mineralogio, botaniko, zoologio. Ĉi-okaze, la nomenklaturetoj kaj terminologioj en Esperanto nature sekvas modelojn etnolingvajn, adaptante ilin al la fonetiko, ortografio kaj fleksio de la zamenhofa lingvo, **planlingvo**.

Antaŭ nelonge venis al mi decidoj de Terminografia Komisiono pri Botaniko kaj Zoologio, kreita de TEC (Terminologia Esperanto-Centro de UEA). Inter la decidoj mi trovis jenon:

"Estas akceptita kiel provizora solvo (ĝis la demando pri esperantigo de propraj nomoj estos solvita de Akademio de Esperanto) konservi speciajn epitetojn faritajn el propraj nomoj (personnomoj, ŝipnomoj) sensanĝaj, kun majusklo kaj diakritaj signoj, kun aldono nur de ligstreko kaj la adjektiva finaĵo -a (ekz. *Müller-a*, *Nunez-a*)."

Nu, tiu ĉi decido atestas

unue pri hezitemo de biologoj-esperantistoj asimili proprajn nomojn speciajn epitetojn, due pri okulfrapa nekohereco nomenklatura, ĉar la propranomaĵo genosubstantivoj estas tradicie kaj memkomprene asimilataj: Ekz. la grimparbedo visterio (*Wisteria*, laŭ *C. Wistar*, profesoro de Pensilvania Universitato) estas registrita en PIV. Certe oni koncedas, ke "*Wistar-io*" aspektus tre kurioze en Esperanto. Simile, la subtila alpfloreto hutĉinsio (*Hutchinsia*) ricevis nomon laŭ la irlandanda alpistino *Hutchins*. Sed nun oni konsciis, ke ekzistas en la zoologia nomenklatureto *Branta hutchinsi*, nomo de anseredo. Ĉu la plantnomo restu hutĉinsio, dum la birdo estu nomata "*Branto Hutchins-a*", kvankam la nomenklaturetoj reguloj preskribas minuskladon de la speciaj epitetoj? Ĉu branto hurĉinsa ne estus pli logika, pli belsona, pli praktika?

(Parenteze: Kiel esperantista zoologo prononcu la lingvan monstron "*Hutchins-a*"?).

Evidente, necesas plej serioze esplori ĉiun terminon de onomastika deveno laŭ ties originalaj prononco, ortografio, etimologio kaj ceteraj lingvaj aspektoj. Surbaze se la kompleksa esploro estas proponenda tiu aŭ alia solvo. La metodon demonstru ree tri elkzemploj:

1.1. La ĥemia elementon nomitan laŭ *Albert Einstein*, Esperanto devas asimili plej probable tiel, ke unue oni konstatas la germanlingvan devenon de la familia nomo. La germanoj prononcas EI proksimume kiel AJ, sed la plej fidela fonetika ortografio tro difektus la germanan skribformon, perturbante la laŭalfabetan sinsekvon de la ĥemiaj elementoj. Male, akcepti la originalajn EI kun la en

Esperanto dusilabaj vokalduopoj signifus krei malbelsonan formon sessilaban. Ŝajnas do prudente, se la Ĥemiistoj-esperantistoj akceptas la formon: ejnŝtejnio. Eble usonanoj povus kontraŭdiri, ke *Einstein* ne plu sentis sin germano, sed la prononco usona ("*ajnŝtajn*") difektus la originalon simile kiel la germana.

1.2. La biero de *Pilzen* estas mondfama. Tamen, la originalaj ĉeĥaj ortografio kaj prononco ne estas akcepteblaj en Esperanto. Ĉar la oldĉeĥa nomo sonis *Pilisin* kaj ĉar la diverslingvaj formoj evitas la silabokrean L, enmetante I, la formo "pilzenja" biero ŝajnas esti plej taŭga. Kelkaj esperantistoj eble preferos "pilzena", sed oni konsideru, ke *Zamenhof* esperantigis *Boulogne-sur-Mer* per Bulonjo ĉe maro. La franca GN je sonas precize same kiel la ĉeĥa Ň, la hispana ĉ k.t.p. (Pri la silabokreaj L, R mi skribis en 1978.)

1.3. **Oĥotska maro** situas nordokcidente de Azio. Tiun ĉi ekzemplon mi elektis por montri, ke ankaŭ nia vortara Biblio", nome PIV, povas grave erari. La de ĝi registrita formo "*Oĥocka*" ne konsideras, ke la rusan TS ne eblas transskribi per C. Ja la maro estas nomita laŭ la urbo *Oĥotsk*, kies SK estas adjektiva sufikso aldonita al la tribnomo *Oĥot*; fine, tiu tribnomo estas derivita de la urbo *Oĥa*. Jen la koneksoj, kiujn oni ne rajtas neglekti (1972).

2. **Nepre evitebla** (mi ne asertas, ke evitenda) estas asimilado de personaj nomoj (ĉu individuaj, ĉu familiaj), se ĝi ne postulas terminologio aŭ nomenklaturon. Okaze de virinaj nomoj, Akademio de Esperanto sisteme faris principan mispaŝon, rekomendinte por ili la finaĵon -A, kiu ja estas laŭfundamente rezervita por adjek-

tivoj. Ĉi-okaze estas pli prudente konservi formon originalan (se ĝi mem ne finiĝas par A), ekz. *Afrodite*, ol kripligi ĝin per "*Afrodita*" (PIV), se oni ne emas akcepti la senripoĉe asimilitan formon: *Afrodito*.

Okaze de "*Afrodite*", la formo originale helenskriba, estas redonita latinskribe per la rimedo de la esperantlingva alfabeto. Jen procedo necesa okaze de ajna nomo originale **nelatinskriba**. Okaze de nomoj **latinskribaj** necesas konservi la literojn kaj eventualajn diakritajn signojn de koncerna originalo: *Waringhien*, *Kamarýt*.
3. Iuj esperantistoj inklinas al asimilado aŭ tradukado de siaj **familinomoj**, tiel fariĝante objekto de akra kritiko eĉ moko fare de siaj "malsamideanoj". Ankaŭ ĉi-okaze mi rekomendas toleremon. Ja ne ĉio eksternorma, nekutima meritas bruskan kondamnon. Ni rigardu la fenomenon kiel "trajton kaj rajton" pri ilia propra sinestrprimado.

Analoge, iuj - precipe edukantoj de denaskuloj - ofte esperantigas **vilaĝeton** aŭ kvar-talon, kie ili vivas, kiun ili vizitas k.s. Ni ne konsideru tion ridinda, sed pli eble kiel pruvon, ke nia planlingvo "vivegas". Ne neglektebla estas ankaŭ la cirkonstanco, ke tiasecaj esperantigantoj foje sukcesas lanĉi taŭgajn solvojn.
4. Do, ĉu ni aŭdacu **prognozi**? Asimilado de propraj nomoj en Esperanto estas proceso, kiun markas **natureco**. Ĝi ja progresas lante, hezite, ekde okazoj, kie ĝi evidentiĝas neevitebla, jen senproblema, jen problemrica, ĝis okazoj eviteblaj, sed garantiantaj uzon pli praktikan ol kapablas oferti nomformoj originalaj.

Nuntempe oni povas konstati - kaj sen duboj povos ankaŭperspektive - ke asimilado kon-

centriĝos en tri ĉefaj fokusoj:
- la familia (ekz. por denaskuloj ĉiutage parolantaj Esperanton)
- la regiona (ekz. por kluboj, landaj asocioj)
- la terminologia (ekz. por sciencistoj kaj teĥnikistoj).

Bremsi la proceson estus laboro sizifa. Pli adekvata

montriĝus sinteno indiferenta aŭ eĉ tolerema. Tamen, se iu pretas elspezi konsiderindan energion, tiu dediĉu ĝin prefere al trovado de plej taŭgaj asimilad-meĥanismoj. Kompetentulo certe procedos surbaze de sia lingvo gepatra, memkomprene akordiĝante al la naturo de Esperanto.

Prago 18.6.1993

Referencoj:

Kafka, J. - Pumpr, T. (1972): Poŝatlaso de la mondo. Kontribuo al geografia nomenklaturado en Esperanto. - *Scienca Revuo*, 3-27. *Beograd.*

Kavka, J. (1978): Esperantigo de la ĉeĥoslovakaj loknomoj. - *Scienca Revuo*, 119-128. Ĉapeko.

Kavka, J. (1981): Onomastiko en fakterminoj konsidere ilian esperantiĝon. - Kolekto de la referaĵoj de konferenco AEST, 1, 6-14. *Žilina.*

Kiel taksu neceson de neologismoj?

En Starto n-ro 2/93 kaptis mian atenton la artikolo de s-ro Golden pri kelkaj novaj vortoj, precipe brodkasti" kaj "ivrito".

Por pritakso de neceso de neologismoj mi havas kelkajn spertaĵojn de klasikuloj de Esperanto, inter aliaj de Edmond Privat. Li distingas en sia verko *Esprimado de sentoj en Esperanto* precipe du grupojn de lingvoj: etiketan kaj priskriban. Esperanto estas lingvo priskriba. Tiu ĉi eco estas granda avantaĝo kaj ankaŭ pritaksilo (mezurilo). Antaŭ ol oni akceptas novan vorton, oni devas ripete kaj ripete prijuĝi, ĉu ne eblas krei novan vorton "el propraj fontoj", t.e. per kunmetado de eroj priskribantaj la novan nocion.

Ni havas tri motivojn por tiu ĉi starpunkto:

a) unu el la plej gravaj avantaĝoj de Esperanto, kaj tiel

toj por lernado kaj uzado de Esperanto estas ĝia relativa facileco, strukturoco kaj logiko. La facileco kuŝas en strukturoco de la lingvo, kiu denove ligiĝas kun la logiko. Ekzemplo: en neniu nacia lingvo la profesioj estas esprimataj senescepte konsekvence per la sama finaĵo (=isto) kaj neniu lingvo distingas aktivadon profesionan kaj amatoran (instruisto - instruanto). Eĉ malbele aspektantaj kunmetaĵoj plenumas sian mision, se ili estas unuavide kompreneblaj, facile lerneblaj kaj precizaj.

b) vortoj kunmetitaj el pluraj eroj estas "klasika" ekzemplo, kiom taŭga estas Esperanto por permaŝina prilaborado de tekstoj, ĉar la kunmetaĵ-eroj estas tipaj elementoj, kiujn la maŝino facile prilaboras ne bezonante postuli envicigon de nova radiko.

c) Ekstereŭropanoj riproĉas

unu el la plej gravaj argumente Esperanto estas "eŭropeca" lingvo, uzanta precipe la radikojn de tiam-iam reganta lingvo, nun de la angla. Iu gvidanto de la ĉina Esperanto-Ligo diris antaŭ kelkaj jaroj tute malkaŝe: se ni plenigas la lingvon per anglaj radikoj, niaj studentoj diras, ke estas pli oportune lerni rekte la anglan, en kiu ekzistas plej riĉa faka literaturo.

Konsiderante tion, mi ne povas rekomendi enkonduki la vortojn:

a) **brodkasti**, ĉar tio estas perforta enkonduko de angla radiko (ĉi tie kunmetaĵo konsistanta el: broad, cast). Por tiu ĉi nocio en multaj lingvoj estas uzata iu formo prenita el la nocioj "sendi" aŭ "meti" (cs: vysílat, de: senden, fr: émettre, pl: nadać ktp.). La ĝisnunaj vortoj "dissendi" aŭ "elsendi" tute sufiĉas, estas kompreneblaj kaj oni ne bezonas enkonduki novan radikon.

b) simile la vorto **drivilo**, kiu ne estas en la menciita artikolo, estas esprimata per iu vorto, kiu esprimas movadon, direktadon (en. driver, de: Laufwerk, cs: pohon). Ĉar temas pri ilo de movo, tute sufiĉas "movilo". (Plie "drivi" jam signifas "flosi laŭ puŝo de fluo aŭ vento devianta el la difinita vojo" - redakcia rim.)

c) simile la esprimo por presado (en: to print, printer, t.e. kaj homo, kiu presas, kaj maŝino, de: Drucker, same kiel en la angla, cs: tiskárna, t.e. aparato kaj entrepreno por presi). Esperanto kapablas tute precize distingi: presi/premi - cs: tisknout, presilo = tiskárna (aparato) - presejo = tiskárna (entrepreno); de: Drucker - presisto, presilo; en: print - presi, printer - presisto, presilo k.s.)

Mi ne estas kontraŭulo de iu ajn lingvo, ankaŭ ne de la an-

gla. Mi nur ne konsentas kun (precipe la ĉinoj kaj japanoj), amasa enkondukado de iu lingvo nur pro tio, ke ĝi estas aktuale superreganta lingvo.

Antaŭ multaj jaroj aperis pri tiu ĉi temaro artikolo en Heroldo, en kiu kelkaj frazoj estis skribitaj per neologismoj transprenitaj el la lingvoj plej uzataj en Afriko, swahili kaj haussú. La teksto estis por ni eŭropanoj tute ne komprenebla. Simile okazas al la neeŭropanoj, se ni troigas enkondukadon de superfluaĵoj novaj vortoj.

Jiří Laube

Rim. de la redakcio:

Koncerne la duopon *presiprinti*, la problemoj estas, ke la komputila "presado" ne estas presado, sed ĝi pli similas al tajpado. Presado estas multobligado de gravurita teksto per premo (= preso) sur papero en miloj da ekzempleroj, ĉiam la tuta paĝo samtempe. Komputila "presilo" (printilo) presas unu ekzempleron, literon post litero kiel tajpilo, sed ĝi kapablas ankaŭ desegni kaj ĝiaj literoj ofte similas al kompostitaj presliteroj. La rezulto (precipe el laseraj printiloj) aspektas kiel rezulto de presilo, kvankam nur en unu ekzemplero (kiun oni poste fotas kaj multobligas per vera presilo). Simple: *tajpi-printi-presi* havas diferencajn signifojn.

-mm-

ESPERANTISTOJ-HANDIKAPULOJ EN TELEVIDO

La 14-an de julio 1993 elsendis la ĉeĥa televido je la 6-a kaj 5 minutoj matene informon pri internacia renkontiĝo de handikapuloj en Kladno. "Kaj ili ĉiuj interkompreniĝis per Esperanto," diris la parolisto.

VUK ECHTNER

Malfacila tasko, enŝovi sur tre limigitan spacon la vivon kaj agoriĉon de persono, kiu fidele, kun senafekta modesteco, dum pli ol 70 jaroj plugas sian sulkon kaj en la Movado, kaj en aliaj kultursferoj!

Vuk Echtner naskiĝis la 10-an de julio 1905 en Ronšperk-Poběžovice ap. Horšovský Týn, en familio kun 14 infanoj. (La patro: hejtisto, la patrino popola kuracantino). Li forlasis la nomon Wolfgang en la germanlingva bapto-dokumento kaj akceptis la slavan Vuk. Sepjara, li konatiĝis en 1912 kun Esperanto per kurso de J. Šupichová en "Mladý čtenář" (= Juna Leganto). 15-jara, li komencis propagi la Internacian Lingvon. Lernante la rusan kaj anglan kaj stenografion li fondis (1920) Ĉeĥan pruntan bibliotekon sub egido de *Národní jednota pošumavská* (Nacia Unio en la regiono de Bohema Arbaro). De 1922 li laboris en Prago kiel internacia korespondisto en industria entrepreno kaj membriĝis en EK Praha. Sekvis partopreno en Universalaj Kongresoj en Nurenbergo, Berno, Marsejlo, Antverpeno kaj Blindula Kongreso en Liono. Post konatiĝo, en Rotenberg, kun la fama rusa blinda verkisto Eroŝenko li specialiĝis en la porblindula Esperanto-movado, kaj ellernis la brajlan reliefan skribon, ne nur por legi, sed por ĝin dum jardekoj utildone aktive uzadi.

Sekvis organiza laboro por la grava Internacia Konferenco "Paco per lernejo" 1927 en Prago; kun Robert Kreuz (UEA) li stenografis ĝiajn prelegojn. En 1928 li akceptis redaktadon de la porblindula brajla revuo "Aŭroro", fondita en 1918. (Ĝi estas en Ĉeĥa Respubliko E-gazeto kun absolute plej longtempa aperado). En la blindula

esperantista movado estis la kerno de lia senlaca aktivado. La "Aŭroro"-n li levis laŭ amplekse kaj enhave kaj sukcesis akiri ĝian senpagan sendadon al alilandaj blinduloj en 45 landoj, kio daŭras plu ankaŭ nun. Li redaktis ĝin ĝis 1975 - 47 jarojn - kiam la laboron transprenis lia disĉiplo Jiří Vychodil (blindul-sekciestro de ĈEA). Li zorgis pri IBIS -

Internacia Blindula Informejo kaj Statistikejo. En sia porblindula kurso li konatiĝis kun sia lernanto, la posta fama komponisto Jaroslav Ježek. Al la komponisto K.E. Macan li helpis fondi kulturalan vivon de nevidantoj, organizitaj en SOĈNE - Societo de Ĉeĥoslovakaj Nevidantaj Esperantistoj.

1931: li edziĝis al s-anino Antonia Richtrová, kursanino de Šupichová, kaj "Tonĉi" estas daŭre lia fidela kunlaborantino; ili ambaŭ trapasis ŝtatan ekzameniĝon pri Esperanto. Vuk fariĝis junular-sekciestro de EAĈSR kaj gvidis ĝian Lingvan komisionon.

1935: kunlaboro super eldono de Ĉeĥoslovaka Antologio (Budapeŝto) per tradukoj el Alois Jirásek, Julius Zeyer, Fraňa Šrámek, Helena Malířová, Anna Marie Tilschová, Jindřich Šimon Baar kaj Jan Vrba; por nevidantoj li eldonis la tradukojn en la punkto-skribo kaj pretigis Esperanto-ĉeĥan vortaron.

En la 50-aj jaroj li instruis gramatikon en kelkaj Someraj Esperanto-Tendaroj (Žimrovice, Popelná) kaj etike influadis la tendaranojn.

Post 1945 li studis kromoku-

pe pedagogian fakultaton por dediĉi sin al edukado de blindaj infanoj en la Deyl-Instituto, malgraŭ la malpli alt-salajro tie. En 1946 li prelegis, kun Bendová, en la Orientista Instituto de la Scienc-Akademio pri la religia movado de Bahá-u'llah, kun kiu li konatiĝis pro ĝia oficiala uzado de Esperanto. Tiu intereso kaj ankaŭ rifuzo kunlabori kun la Sekreta polico estis por li sortobata, dum la komunisma reĝimo; en 1956 trafis lin enkarcerigo pro lia porpaca internacia kunlaboro kun la formiĝanta Bahaa Esperanto-Ligo kaj UEA. Kondamnita 25.9.1958 (en Ostrava) al karcerio 3,5 jaroj pro "daŭra formo de malamika agado pro la malutila bahaista doktrino" li, noblulo, travivis 22 monatojn i.a. sub la teruraj kondiĉoj de la krimula karcerio en Leopoldov. Ja ankaŭ lia revuo (pro amnestio en 1960) kun sendenta buŝo ilustris la tiean "medion".

De 1965, kiel pensiulo, li vivis kun sia edzino en la regiono Ĥodujo, dum pluraj jaroj, en sia ĉarma dometo en Díly; en la lastaj jaroj la paro vivas en pensiono en Domažlice. Efektiviĝis tre ampleksa korespondado; ekz. en 1975: 5 858 korespond-eroj prilaboritaj. La korespondantoj troviĝas en 29 landoj. Krome, li gvidas regionan (ne-esp.) kronikon, por la komunumo.

En Ĥodujo, s-ano Echtner daŭrigas plu la fakojn de sia E-agado kaj aldone transskribis brajle 52 fremdlingvajn lernolibrojn por ebligi al nevidantoj studi fremdajn lingvojn. La nombro de tiuj prespretaj 52 lernolibroj ampleksas 332 800 foliojn, kiujn li devis kovri per milionoj da "pikoj" de la palpo-skribo, en fremdaj lingvoj. Faro apenaŭ kredebla, sed fakta! - Tiucele li devis ek-mastri ses pluajn fremdajn lin-

gvojn.

En la lastaj jaroj, Echtner iĝas ankaŭ personulo de kultura-kleriga vivo de la distrikto Domažlice. Ankaŭ la edzino "Tonĉi" plu aktivis en la pensiono, socie kaj societe. Ekde 1981, la samideano kunlaboras kun la Ŝtata regiona arĥivo en Plzeň (Pilzeno), zorge preparante kaj pakante por ĝi sian riĉan heredaĵon. La Arĥivo volonte akceptas ĝin poparte por ĝin konservi; ĝi jam posedas centojn da kilogramoj de la Esperanta heredaĝo! - kaj eĉ modeste repagas al li la kostojn. (Laŭ mia scio, unika fenomeno en nia lando!) - En 1990 pasis 60 jaroj de utildona kunlaboro de la geedzoj en la ĝenerala kulturagado.

S-ro Echtner ricevis la pintan distingon flanke de la blindula komunumo, la medalon "Emilie Suchardová" (cetere ankaŭ esperantistino), honoran insignon de MEM, honoran membrecon en la Ĉeĥa Esperanto-Asocio.) Mi hontas, ke ĝis nun li ne estis-proponita al honora membreco en UEA, kiun li nepre meritias. Intervjuita de gazetoj, Televido, Radio.

"Rudé právo" (= ruĝa rajto), organo de tiu reĝimo, kiu lin tiel kruele damaĝis, aprezas lin (11.2.1982): "Jen estas vere giganta verko de humaneco, en la plej larĝa vorto-senco". Kaj "Domažlicko" en 1991 jene resumis pri la geedzoj Tonĉi kaj Vuk Echtner: "Diamanta estas ne nur ilia geedziĝo-jubileo, sed ankaŭ la koroj de tiuj homoj, kiuj ĝis nun disdonas ĉirkaŭ si spertojn kaj vivoforton." - Certe, esperantistoj povas fiere konsenti!

Dio donu, ke tiu forto ne forlasu lian nun malsanan kordon!

Jaroslav Mařík
(15.5.1993)

FATALA LETERO

(rakonto kun krucenigmo)

En eŭropa lando vivis familio, gepatroj kun sia filo J., gaja deknaŭjara junulo. La familianoj estis kleraj, posedantaj ankaŭ plurajn lingvojn. La gepatroj - ne la filo - parolis ankaŭ esperante.

Itutage J. ricevis registritan leteron el Sudameriko tutskribitan esperante, do per lingvo, kiun J. ne sciis. Tial li petis sian patrinon traduki la leteron kaj ĉefe klarigi, kion la letero enhavas, kiu skribis al li, kion kaj kial - li ja nek scias esperanton, nek konas iun esperantiston!

La patrino prenis la leteron eklegante ĝin. Subite ŝi paliĝis, ruĝiĝis, violiĝis, bluiĝis kaj diris: "Tio estas terura! Nepre diru nenion al la patro. Ne diru, ke mi jam legis la leteron! Jen, prenu rapide iom da mono kaj rapidegu for el la hejmo!" Dirinte tion ŝi adiaŭe kisis la filon. J. estis tre konfuzita pro ricevo de la letero, sed ĉefe pro la stranga evoluo de la afero.

Elirinte, J. renkontis la patron, kiu en bona humoro alparolis sian filon. Nun J., en kiu baraktis diversaj ideoj kaŭze de la ĵus ricevita letero - malgraŭ la averto de la patrino - decidiĝis demandi la patron pri klarigo de la afero.

La patro tralegante la leteron subite paliĝis, ruĝiĝis, violiĝis, bluiĝis kaj diris: "Tio estas terura!" Poste li returniĝis por konstati, ĉu hazarde iu ne vidas lin legi la leteron, tuj parolante al sia filo: "Diru al neniuj, ĉefe ne al la patrino, ke mi tiun ĉi leteron legis. Hejme vi ne povas resti. Mi ne estas kapabla klarigi al vi la aferon, sed estus taŭge, ke vi foriru plej eble malproksimen, ekzemple transmaren, kaj jam ne revenu!

Jen, prenu iom da mono por vojaĝo, adiaŭi!"

Persekutata de obskuraj ideoj, la junulo enŝipiĝis kaj navigis Sudameriken. Dum la vojaĝtempo la ŝipkapitano ekŝatis J., kiu tamen ŝajnis al li tro malĝoja. Ĉiam, kiam li vidis la junulon, li insistis, ke J. konfesu la kaŭzon de sia malĝojo. Post kelke da tagoj J. diris al la kapitano: "Mi timas, ke vi elŝipigu min sur iun dezertan insuleton aŭ rekte elĵetu min maren, kiam mi dirus al vi pri mia turmentego." La kapitano ĵurpromesis, ke nepre li ne faros tion.

La junulo do donis la leteron al la kapitano, kiu tralegante ĝin subite paliĝis, ruĝiĝis, violiĝis, bluiĝis kaj diris: "Estu feliĉa, ke mi promesis al vi, alie mi ne scias ..."

Atinginte Sudamerikon J. baldaŭ sukcesis trovi loĝlokon, eĉ laboron. Lia naturo dum mallonga tempo ŝanĝiĝis. El gajpetolema junulo li fariĝis silentema, melankolia homo. Li amikiĝis kun C., filino de loĝejuanto, kiu ankaŭ klopodis ekscii pri lia melankolio. Post certa tempo gejunuloj reciproke enamiĝis. Sed C. sentis, ke senĉese estas inter ili io, kio malhelpas ilian interkompreniĝon kaj feliĉon. Post plurmonata insistado J. finfine konfidis al C. la tutan aferon.

C. diris al J., ke ŝi mem ne posedas esperanton por helpi lin, sed ke ŝia bona amikino estas esperantistino, kiu certe tradukos la leteron, ke ne estas motivo por timo. Ambaŭ do vizitis la amikinson kaj rakontis al ŝi pri la tuta afero. Ŝi kapjesis kaj diris: "Mi estas forvojaĝonta, nun mi ne havas libertempon, sed bonvolu lasi la leteron ĉe mi kaj tuj post

reveno mi tradukos ĝin." Pasis tago post tago, sed la amikino ne venis. Tial ili denove vizitis ŝin kaj trovis ŝin iel embarasita. Kiam J. senpaciencie

demandis ŝin pri la letero, ŝi subite paliĝis, ruĝiĝis, violiĝis, bluiĝis kaj diris: "Pardonu, sed mi ..." (*respondo en kaŝfrazo*)

1	2	3	4	5	6	7	8	9

- 1) Edziĝfesto
- 2) Apliki forton sur iun korpon, malvaste teni
- 3) Ne vole seniĝi je posedaĵo, ne plu havi
- 4) Kunligi per fadeno
- 5) Eligi pro varmeĝo akvecan fluaĵon tra la poroj de la haŭto
- 6) Kristana solena festo por memori la reviviĝon de Jesuo
- 7) Malgranda aparta ejo por kelkaj personoj en teatro
- 8) Plene liberigita de ŝuldo
- 9) Fikse kunmeti la diversajn partojn de aparato

CLAUDE MARTINS EN MORAVIO

En junio 1993 vizitis esperantistajn klubojn en Brno kaj Olomouc franca samideano Claude Martins. Li prelegis pri siaj vojaĝoj tra Tuniso, Maroko kaj Algerio. Per projekciado de multaj interesaj diapozitivoj li rakontis pri memorigindaĵoj kaj naturbelaĵoj de la menciitaj ŝtatoj kaj la sahara dezerto, kiu apartenas al ili. Li partoprenis ankaŭ la suprenmarŝon al la supro de la monto Pradéd (aranĝo de EK Jeseník):



Nia recenzo:

Humberto de Leite de Araújo:
Pacon kaj fratecon. Tradukis
Janeiro, 326 p., ilustrita.

De Francisko el Asizo por vi...
Delio Pereira de Souza, Rio de

La romano priskribas la vivon de Francesco Bernardone (1182-1226), el la itala urbo Asizo (Assissi). Lia juneco estis plenigita per diboĉado, aminduma kantado al knabinoj, simple per plezurado de senzorga filo de riĉa komercisto. Kiel 25-jara li foje promenis surĉevale en la ĉirkaŭaĵo de la urbo kaj renkontis leprulon. La spertaĵo forte skuis lian animon. Malsaniĝinte li sonĝis, ke Dio lin alvokas rekonstrui Lian preĝejon. Francisko komence pensis, ke temas pri la proksima kaduka preĝejo de Sankta Damiano, kiun li propramane vere riparis, sed poste li komprenis, ke la riparinda kirko estas la tuta eklezio. Disdomnante siajn riĉaĵojn al malriĉuloj, Francisko estis de sia patro pelata antaŭ episkopan tribunalon, kie li senvestiĝis, redonis la vestojn al la patro kaj tute nuda por signi, ke naskiĝis nova homo, forlasis la urbon (aprilo 1207). De amiko li ricevis simplan mantelon kun kapuĉo kaj tiel vestita li komencis sian misiistan agadon, fondis monaĥan ordenon preskribantan simplecon kaj malriĉecon, helpemon al suferantoj. Li renkontis multan mokadon, persekutadon, eĉ batadon, sed liaj pacienco, pieco, heroa bonkoreco kaj sentima helpemo eĉ al lepruloj, liaj saĝaj respondoj al ĉiuj demandoj konvinkis multajn, ke li estas vivanta sanktulo, kaj liaj sekvantoj kreskis. La ordeno estis eĉ agnoskita de la papo. Korpe elĉerpi-ta li mortis en sia 44-a jaro kaj jam du jarojn poste li estis kanonizita. Siajn opiniojn li esprimis ankaŭ poeme en diversaj kantoj, kiuj lin envici-gas inter la plej grandajn mez-

epokajn poetojn (Kanto al la Frato Suno).

La verko de Humberto de Leite de Araújo, tradukita el la portugala en bonkvalitan Esperanton, prezentas la vivon de la sanktulo el vidpunkto de pie kredanta homo kaj adepto de spiritismo. La spiritistoj kredas, ke la animoj de mortintaj personoj vivas en la transa mondo, de kie ili povas paroli kun nia mondo (cismondo) pere de mediumoj (homoj dotitaj per speciala talento komuniki kun spiritoj). Mortintaj verkistoj kaj poetoj eĉ povas dikti novajn verkojn. Ĉiu animo plurfoje revenas en la cismondon enkorpiĝante en konkretajn homojn, kiuj normale naskiĝas kiel beboj, kreskas, maturiĝas kaj maljuniĝas, ne memorante pri siaj antaŭaj vivoj. Nur mediumo povas malkovri, kiam kaj kie la animo vivis en la psasinteco. Ekzemple al la fondinto de spiritismo, la franca profesoro Denizard Hippolyte Léon Rivail (1804-1869), mediu-mo sciigis, ke en la tempo de Julio Cezaro li estis druido en Gallujo (nuna Francio) kaj havis la nomon Allan Kardec, kaj en la mezepoko li estis ĉeĥa predikisto Johano Hus, ŝtiparumita de la Inkvizicio kiel herezulo en 1415. Tial la spiritistoj ne parolas pri naskiĝo kaj morto, sed pri enkarniĝo kaj elkarniĝo, la vivantoj estas enkarnuloj. Simile kiel la budhismo ankaŭ la spiritismo kredas, ke niaj nuntempaj feliĉoj aŭ malfeliĉoj estas nur rekompenco aŭ puno pro niaj agoj en la antaŭa vivo.

La libro estas hibrido de romano kaj dokumenta biografio. Kelkaj ĉapitroj similas pli al ĵurnalistaj aŭ teologiaj arti-

KIEL ONI ARANĜU EFEKTIVE
LA ETERNAN KOMENCADON

koloj, aliaj al artverko kun dialogoj, priskriboj de sonĝoj kaj vizitoj de spiritoj el la transmondo. La konservitajn informojn pri la vivo de Francisko el Asizo devas ĉiu biografo disvolvi kaj iomete kompletigi laŭ sia fantazio, tial ekzistas negravaj diferencoj ankaŭ inter tiu ĉi verko kaj la filmo de Franco Zeffirelli "Frato Suno, fratino Luno", el kiu estas prenitaj fotoj kiel ilustraĵoj. Krom ili la libro enhavas ankaŭ reproduktajn de memoraĵojn pri la sanktulo (liaj portretoj, groto, vesto, dokumentoj k.s.), proksimume kvindek da nigraj-blankaj bildoj. Kompare kun la romano de la greka verkisto Nikos Kazantzakis "Malriĉulo de Dio" la verko de Humberto de Leite ne estas tiom artisme impresa kaj filozofie profunda, ĉar pia admiro kaj adorado ofte superas la arton kaj filozofion, sed ne estas facile konkurenci al unu el la plej grandaj aŭtoroj de la mondliteraturo, al kiuj Kazantzakis apartenas. Cetere, neniu verko povas sola bildigi la vivon de eminenta persono komplete, tial ĉiam utilas konatiĝi kun pluraj biografioj, ĉar ĉiu alportas novajn vidpunktojn kaj ĵetas sur la figuron novan lumon. Jen la lumo spiritisma...

La libro "De Francisko el Asizo por vi..." estas sendube grava riĉigo de la biografiaj verkoj pri la sanktulo ĝenerale kaj de Esperanto-literaturo speciale. Eĉ por alikonfesiuloj aŭ ateistoj ĝi prezentas multajn ideojn por pripensado kaj meditado, ĉar la filozofio de Francisko konkretigita per lia persona vivo apenaŭ povas lasi indiferenta pensantan homon. Ankaŭ mi ne kredas ĉiujn asertojn kaj opiniojn de la aŭtoro, sed ĝuste tiaj libroj, kiuj provokas polemikon, pensigas plej multe.

Miroslav Malovec

Kvankam estas konate, ke Esperanto estas kompare al naciilingvoj regebla post mallonga, ne tro pena lernado, multaj gelerntantoj evitas sukcesplene la atingadon de bona lingvoscio kaj parolkapableco. Ĝenerale oni nomas tiun fenomenon "Eterna Komencado", sed tiu esprimo malbone priskribas la problemon.

Unua fakto estas, ke la evitado de bona esperanta lingvoscio kaj parolkapableco estas tre komplika. Nur malmulte da komencantoj sukcesas sen helpo de tiurilate sperta instruisto.

Due oni devas diferencii inter la specoj de "Eternaj Komencantoj". Ni havas tie la "ĝentilulojn", ĉe kiuj oni jam post kelkminuta klopodo de interkompreniĝo scias, ke ili scipovas nenion legi kaj ke ili kapablas konversacii kondiĉe, ke la temo de la babilado estas konata almenaŭ unu tagon antaŭe kaj ili povas prilabori la aferon skribmaniere. Tiujn gesamideojn oni nomu ĝentilaj, ĉar ili malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj ankoraŭ dum jaroj strebas plibonigi sian staton kaj en renkontiĝoj aktive klopodas, kvankam ofte sen rezulto, konversacii.

Aliaj el vidpunkto de la ĝenerala lingva kapableco proksimume samnivelaj specoj estas la "rezignuloj" kaj la "rekruĝigantoj". La unuaj laŭdire boras la lignon tie, kie ĝi estas plej maldika kaj malrezistema. Tiuj niaj kamaradoj rezignas bori, kiam nenia maldika lignaĵo jam estas trovibla. La duaj lernas kelkajn lecionojn kaj dume tiel entuziasmiĝas, ke al ili pro pena varbado por Esperanto ne restas tempo por lerni la lingvon.

Kelkaj "rekrutigantoj" estas krome la ĉefaj uzantoj de ĉiuj pecaj gluaĵoj kaj insignoj produktitaj de la mond vasta esperantista industrio. Ili aspektas kiel sinceraj ŝatantoj de iu ajn piedpilka klubo kaj nomiĝas "afiŝkoloroj". Nek la "rezignuloj" nek la "rekrutigantoj" estas tiom klopodemaj kiel la "ĝentiluloj", sed en la konversacio ili emas aktive partopreni, se estas konvenaj unuopaj vortoj en ilia kapo kaj la parolado estas kontraŭnature malrapida.

Tria speco estas la "spionoj". Mi iomete hezitas nomi ilin samideanoj, ĉar ilia konduto estas nur malfacile rigardebla kiel konvena al la idealoj de la esperantistoj. Normale oni opinius, ke tiuj personoj scias nenion saĝan pri Esperanto. Sed tre sintrudemaj esperantistoj tamen sukcesas eligi el ili la bone kaj fluante esprimitan frazon: "Mi komprenas, sed mi ne parolas (kun Vi)." Aldonendas, ke la enciklaĵo estas almetaĵo de la aŭtoro por prilumigi, ke la spritaĵo ne nepre brilas je ĝentileco. La ĝusta definado kaj honorigado de la diversaj specoj de la "Eterna Komencado" ŝajnas esti necesa, por ke la gelernantoj povu bone elekti la konvenan.

Nun estas la vico por montri al la estimataj ĝelegantoj, kiujn konsilojn oni ĝenerale adaptu, por ke la gelernantoj ankoraŭ post jardekoj apartenu al unu de la supre priskribitaj specoj. Estas konate, ke Esperanto estas projektita de samideano Zamenhof teleni, ke la adepto povu ĝin lerni relative facile. Por fariĝi "Eterna Komencanto" estas do necese, ke oni lernu E-on laŭ la samaj metodoj, kiuj estas uzataj por la nacilingva instruado en la lernejoj kaj regule rezultigas tre malmulte da bonaj uzantoj de la fremda lingvo.

Ne estas konsilinde okupigi pri la vortkonstrua sistemo kun siaj afiksoj kaj sufiksoj, ĉar tiamaniere plimalmultiĝus terure rapide la enkapigeblaj vortoj. Al "Eternaj Komencantoj" pli utilas lerni ĉiun troveblan vortformon aparte el vortlisto. Gramatiko estas ĉefe unu el la plej enuigaj estaĵoj de la tuta mondo; la fakto, ke tiuspecaj spertoj estas kondiĉaj por bona regado de la lingvo, povas ĉi tie vere nur ludi apartan rolon.

Dum lingva instruado oni ofte renkontas nekonatajn vortojn. Por tiuj okazoj estas la vortaroj; oni povas sin bele distri per foliumado. La nuna instruado estas eble iom enuiga kaj se oni perdas la komprenon de la temo, tio ne gravas, ĉar oni povos ja viziti la saman kurson post unu jaro. Demandi pri la mankanta vorto kaj aŭskulti fremdlingvan klarigon, estas tro streĉa, demandado estas krome afero de la instruisto. Korespondado kaj legado de libroj kaj ĵurnaloj fariĝis terure multekostaj. Ankaŭ sen nia helpo ne mortos la poŝtistoj!

Inter la esperantistoj troviĝas diversaj stranguloj, kiuj konsilas al gelernantoj la pensadon en la lernata fremda lingvo. Tiu konsilo estas la plej danĝera el ĉiuj riceveblaj, ĉar per tio finiĝus la bela komencado! Homo, pensanta en la fremda lingvo, estas ja progresanto! Do oni ne aŭskultu tiajn konsilojn, sed serĉu elturniĝojn, kiuj decas al "Eterna Komencanto"!

Se Vi, estimataj gelernantoj, prave adaptas la suprajn konsilojn, eblas doni al Vi garantion, ke Vi ĝis fino de Via vivo apartenas al tiuj personoj, kiujn maldecaj esperantistoj nomas "krokodiloj".

Kun sinceraj salutoj
la aŭtoro de la artikolo

Český esperantský svaz
110 01 Praha 1, Jilská 10

* * * STARTO * * *

Nepravidelný věstník Českého esperantského svazu. Vychází 6x ročně. Je určen členům svazu. Odpovědný redaktor: **Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno.** Administrátor: Karel Daněk, box 425, 660 25 Brno 2.

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Aperas 6-foje jare. Respondeca redaktoro: **Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno, Ĉeĥoslovakio.**

Administratoro: Karel Daněk, poŝta kesto 425, 660 25 Brno 2, Ĉeĥoslovakio
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia asocio. Abonprezo: 14 guldenoj.

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Povoleno JmŘS Brno:

č.j. P/3-8847/91 ze dne 28.8.1991

Podávací pošta:

664 03 Podolí u Brna

Pan MIROSLAV MALOVEC
BOSONOŽSKÁ 15
625 00 BRNO